

# Espero

# Katolika

REVUO MÓNATA EN ESPERANTO

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO  
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

« Unum ovileet unus pastor » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta ».

## ABONEJOJ de E. K.

FRANCLANDO { Ĉe la Direktoro de E. K.  
Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, PARIS V°  
Ĉe librejo Warnier kaj K°, 46, rue Sainte-Anne, PARIS.

ANGLOLANDO { S-o O. Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.  
British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand, LONDON, W.C.

BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, COURTRAI.

BOHEMUJO-AŬSTRIO F. Topič. libr. Ferdinandova 9. PRAHA.

ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI

HOLANDUJO : S-o U. B. van QUET, Ueereneg, 51 bis, UTRECHT.

HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO

ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRINO DE PORDENONE (*Udine*)

HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.

GERMANLANDO Moller et Borel, 95, Prinzenstr. BERLIN.

POLUJO Arct. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.

RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. PETERBURGO

SVISLANDO : Librejo Garin, 20, rue Corraterie, GENEVO.

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe la Direktoro : P-o Em. PELTIER  
Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur  
al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Ĉiuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj

## KONDIĈOJ DE ABONO

**bono jara :** { En Francando : 4 frankoj. | **Unu numero :**  
 Ekster — 3 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

**Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.**

**Anoncoj.** — Tuta paĝo kostos 40 frankojn; — duona paĝo — 25 fr.; — 4<sup>a</sup> paĝo: 15 fr.; — 8<sup>a</sup> paĝo: 9 fr.; — 16<sup>a</sup> paĝo: 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj:

Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 46, rue Sainte-Anne, Paris.

## MUZIKAĴOJ DE S-INO GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr.
En Songo poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr. 60
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i> .....	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.....	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski.....	1 fr. 2

## PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(*La tuta kolekto ĝis marto 1906 5 fr. afrankite*). **Artikoloj legindaj en la kolekto :** Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier). Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée skizo ; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecionoj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj ; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista, ktp. ktp.

## BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
( <i>La du verkoj kune mandatoj 0 fr. 75</i> )	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II <sup>a</sup> Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.....	0 fr. 15
Esperanto ?... Qu'est-ce ?... Franca broŝur. propag....	0 fr. 10

# ESPERO KATOLIKA

(HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X-a, 27-an DE JUN. 1906)

## ENHAVO

Religia Persekutado en Franclando (LA DIREKTORO).....	129
S-o de Valence (VO-PO-LO).....	133
Katolikismo en Centra Oceanio (P. DESCHAMPS).....	134
Pastro de Dio (E. J. WEMAES).....	140
Katolikismo kaj Sociologio (E. de SAINT-AUBAN.) — Esperantigis (VO-PO-LO).....	142
La Providenco (LAMENNAIS. — Trad. ELLEDA).....	145
Vespero de bela tago (LOUIS VRUILLOT. — Trad. VINKO).....	146
La Kolbaso kaj la Hundo (ZAKERL CHARLES).....	151
Paĝo de l'Direktoro.....	152
El nia leteraro.....	154
Propaganda Kroniko.....	157
Notetoj.....	158
Monoferoj. — Ŝakoj.....	160

## RELIGIA PERSEKUTADO EN FRANCLANDO

Ni vivas meze de ruinoj kaj meze de « sensenca », senorda regado politika, laŭ la parolo mem de S-o Clémenceau, estro de l'Franca ministraro.

Pro la preteksto apartigi la ekleziojn de l'Ŝtato, oni simple provas mortigi la katolikan eklezion en Franclando. Malfacila tasko, se oni juĝas per la nombro da « leĝaĵoj », kiujn oni devis fari portio. La dekretoj faritaj por la aplikado de la apartiga leĝo plenigas volumon da 200 paĝoj mi kalkulis 43 dekretojn! Poste oni faris ankoraŭ tri aŭ kvar leĝojn, kiuj restis iel neaplikeblaj kiel la unua! Oni sukcesis nur en unu afero; ŝteli la materialajn bienojn de Eklezio. Kredeble nur tion oni celis, ĉar oni nun lasas nin trankvilaj pri ceteraj punktoj de la leĝo!... Ni do vivas meze de ruinoj, sed nur materialaj: la honoro restas netuŝita, malgraŭ la multaj kalumnioj disjetitaj kontraŭ la katolikoj, kontraŭ la Eklezio kaj Papo.

Ni ne povas rezisti al la deziro citi parton de majstra instrukcio sendita de Lia Episkopa Moŝto Fulbert Petit, (eparkio de Besançon) al la fideluloj.

Li parolas pri la kalumnioj per kiuj la persekutantoj provis senkreditigi siajn suferantojn, « kvazaŭ insulto jetita al subpremito povus iam senkulpigi subpremanton.

### Kalummioj kontraŭ la Papo

« En la celo trompi la popolon, niaj kontraŭuloj ripetadas ke la eklezio estas malamiko de nia nacia konstitucio, malamiko de la Respubliko; sed kiu malscias ke la eklezio estas ligata al nenia formo de registaro? Ĉu la faktoj ne sufiĉe pruvastion? Ĉu la Soverena Pontifiko ne havas bonajn rilatojn kun la Respubliko de Unuiĝitaj Ŝtatoj, kun la Svisa Federacio, kaj kun multaj aliaj respublikaj registaroj tiel, kiel kun monarkaj? Kiam la Papo, la Episkopoj, la pastraro, levis la standardon de ribelo kontraŭ ia ekzistanta registaro?

Oni diras ankoraŭ: se la Franca Eklezio estas senigita de siaj bienoj, la Papo estas kulpa pri tio. La Roma Pontifiko devis nur akcepti la kultajn asociojn, kaj la Eklezio estus ĝuinta la liberecon kaj siajn bienojn... Trompiga sofismo! kiu povas trompi nur supraĵajn kaj malbone informatajn spiritojn. La Papo respondis mem, kaj kun kioma aŭtoritato! Li ne povis perforti sian konsciencan, nek oferi la devojn de sia Pontifikeco por konservi tempajn bienojn. La asocioj postulitaj de la leĝo estis kontraŭ la dia konstitucio de l'Eklezio kaj kontraŭ sia hierarkio.

Supozu ni, ke la Papo akceptis la kultajn asociojn. Jen parokestro, kiu kun la plej fervoraj katolikoj fondas kultan asocion laŭleĝan. — Sed en la sama paroko aliaj homoj, — katolikoj naskiĝe, ĉar baptitaj, — fondas kontraŭan asocion. Ili postulas la uzadon de la preĝejo kaj la ĝuadon de ĝiaj bienoj. Kio okazos? La leĝo, vi diros, ordonas ke la kulta asocio « estu konforma al la ĝeneralaj reguloj de l'kulto, kies ekzercadon ĝi volas prizorgi ». Tre bone, sed tiu demando, ĉu ne vere, estas demando pri dogmo kaj pri religia disciplino samtempe. Nu kiu juĝos kia el la du asocioj estas konforma al la reguloj de l'kulto katolika? Ĉu la parokestro? ĉu l'episkopo? ĉu la Papo? Neniel. Laŭ la vortoj mem de la leĝo, l'afero estos juĝata de la Ŝtata Konsilantaro. Jen tribunalo nur laika, en kiu troviĝas kristanoj, liberpensuloj aŭ Izraelidoj, kiu havos la rajton decidi definitive pri demando, kiun unike la eklezia aŭtoritato havas rajton decidi: Tio estas la neado de l'Krista instruo, kiu sta-

rigis la Papon kaj la Episkopojn por regadi sian Eklezion. »

Jen konfeso de radikala deputato Meunier : « La Papo uzas sian rajton ; li ne volas akcepti la kultajn asociojn, tio lin koncernas. Li estas la absoluta ĉefo de l'katolika Eklezio, li organizas sian eklezion, kiel li volas. Tio ne koncernas nin kaj mi ne konsentas, ke la francaj leĝistoj anstataŭas la Papon aŭ la episkopojn por la organizado kaj regado de l'Katolika Eklezio en Franclando. »

Ĉu tiaj paroloj en la buŝo de radikala deputato ne havas altan signifon ! Ili estas ja paroloj de la Saĝo.

« Oni insistas, kaj diras : La Papo akceptis la kultajn asociojn Germanajn ; kial li ne akceptis la Francajn ?

Pio X-a mem respondis : « Tia riproĉo, li diris, tiel malhavas fundamenton, kiel justecon. Kvankam la Germana leĝo estas kondamnebla pri multaj punktoj kaj nur *tolerata* por eviti pli grandajn malbonojn, — tamen la stato de l'aferoj estas tute malsama, ĉar tiu leĝo respektas la katolikan hierarkion. »

Tion ne faras la Franca leĝo.

### Kalumnioj kontraŭ la Francaj Katolikoj.

Ĉu ni estas homoj mon-amantaj kaj spekulaciistoj ? Vere, la Franca Eklezio nenion posedas nune. Ĉu pro tio ni estas malhonoritaj aŭ defalitaj ? Certe, ne.. El la kvin partoj de l'mondo ĉiutage alvenas al ni atestoj de admiro pro la firmeco, abnegacio kaj sindonemo de l'Franca pastraro. Kaj pro la senbieniĝo suferita, ĉu ni estas senarmigitaj ? Neniel. La respekto kaj simpatio de l'popolo venas al ni pli ol iam.

Ĉu oni kulpigos nin pri fanatikeco ? Tiu ne estas fanatika, kiu, pliamas la estimon de Dio ol la favoron de la homoj, la devon ol la honorojn, la konsciencan ol la promesojn eĉ la plej allogantajn, la malriĉecon ol la sklaviĝon, la sendependecon ol la riĉaĵojn.

Ĉu oni ne diris, ke ni estas ribeluloj ? Ribeluloj kontraŭ kiu, kontraŭ kio ? Neniu estas pli ol ni submetita al la justaj leĝoj.. Ni scias ke Dio estas la unika kaj superega aŭtoritato, el kiu devenas la ceteraj. En la pure civilaj aŭtoritatoj ni salutas ankoraŭ rebrilon de la Dia aŭtoritato. Kiam leĝo homa ne kontraŭas

la leĝon divinan, ni ĝin obeas tutkore; sed kiam tiu kontraŭdiras tiun ĉi, ni forpuŝas la sensencan pretendon perforti la soverenan aŭtoritaton de Dio pri ni, kaj ni rediras la vorton de l'apostolo: « *Non possumus*, ni ne povas ».

Juĝu mem, se oni ne devas obei al Dio plivole ol al homoj.

Kio ankoraŭ? Pri niaj religiaj kredoj, ni obeas al Dio kaj al la Papo, Lia riprezentanto sur tero, anstataŭ ol kurbiĝi sub la tiraneco de homoj senrajtaj pri niaj konsciencoj. Kaj pro tio, post kulpiginte nin pri ribelo, oni riproĉas ke ni estas sklavuloj? Ni demandas la saĝon mem ĉu oni povas esti samtempe ribelulo kaj sklavulo? Ĉu ne estas kontraŭdiro inter la du esprimoj? Ni estus sklavuloj? sed de kio? de la Dia leĝo? Jes! de la leĝoj de konscienco, de honoro kaj devo? Jes! sed tia sklaviĝo nin nobeligas, ĉar pro virto kaj vero ni estas liberaj. *Veritas liberavit* (la vero liberigos vin). Oni estas sklaviĝita, kiam oni kurbiĝas antaŭ homoj pro malkuraĝeco aŭ malforteco. Sed kiam, por resti fidela al ĉiuj siaj konvinkoj, oni faras ĉiajn oferojn; kiam, libere, oni malŝatas ĉiujn profitojn de la vivo; kiam oni malŝatas ĉiujn donacojn aŭ minacojn, oni estas tute alia ol sklavo! Kiu do estas pli sendependa ol tiu, kiu dependas nur de sia konscienco? »

— Tiuj fortaj kaj altaj paroloj de Episkopo Fulber-Petit detruos, mi estas certa, en multaj spiritoj erarajn opiniojn pri la konduto de l'Papo kaj de la Francaj Katolikoj, rilate al la leĝo de apartigo.

EM. PELTIER

P. S. La traduko kaj represo de tiu artikolo estas tute permesata, eĉ dezirata kaj konsilata. Se ĝi estus tradukata en dek aŭ dekkvin lingvoj, se oni sendus al mi ekzempleron de la ĵurnaloj aŭ gazetoj, kiuj publikigos la tradukon, — tiu fakto estus plej potenca por influi sur la katolikoj ĝis nun ankoraŭ indiferentaj pri Esperanto, ĉar ĝi montrus al ili ĝian utilecon. Eble oni povus konverti al Esperanto Lian Episkopan Moŝton mem, aŭtoron de la Instrukcio citata!

Klopodu por tion efektiviĝi, karaj fratoj!

Em. P.

## S-RO DE VALENCE (Valans).

Ĉe la lasta jara publika kunsido de Akademio de la moralaj kaj politikaj Sciencoj, S-ro « A. de Foville » (Fovil) rakontis la vivon de bonfarinta viro, al kiu estis voĉdonata la premio « Corbay » (Korbe). Li estas S-ro de Valence, la nova ĝenerala sekretario de Ruĝa-Kruco. Lia vivado estas « ekzemplo de la kvanto da bonaĵoj, kiujn la morala sufero povas farigi en tiu ĉi malsupra mondo, kiam, anstataŭ ol profundiĝi en siajn pensojn, ĝi serĉadas en la kvietigo de aliulaj suferoj la solajn konsolojn, kiujn kelkaj animoj povas akcepti ». S-ro de Foville ĝin rakontis en tiu klara kaj fleksebla lingvo, kiun niaj legantoj bone konas, kaj kiu havas la grandan arton sin forgesigi, puŝante sur la unuan lokon la homon aŭ la temon pri kiu oni parolas.

En la brulado de la bazaro de la « Charité » (Ŝarite) (Bonfarado), S-ro de Valence perdis sian edzinon kaj du flinojn, kaj de tiu tempo, « lia vivo tute sin klinis al la homa mizero..... ». Dum la milito kontraŭ la « Boxers » (Boxers'oj) la Ruĝa-Kruco decidis ke ĝi senpere agos en Ĥinujo. Ĝi donis konfideme al S-ro de Valence, kiu petegis esti malsanulisto, la oficon de ĝenerala delegito. Li enŝipiĝis la 10-an de majo, 1900, sur la « Notre-Dame du Salut » (Nia Sinjorino de la Savo,) por iri direkti du ambulancojn enhavantajn ĉiu po 200 litoj. Krom la naĝanta hospitalo fondita per la ŝipo aliformigita kaj alia hospitalo en « Nagasaki » (Nagazaki'o) oni kreis 51 postenojn, 4 malsanejojn, kaj 6 ambulancojn, kiuj ebligis gastigi 850 malsanulojn aŭ vunditojn dum 27.000 kuracadaj tagoj. Laŭ la atesto de tiuj, kiuj vidis lin laborantan S-ro de Valence « montris por ĉiuj, kaj prefere por la plej humiluloj, ne konsumeblan bonecon ». Reenirinte Francujon, li okupis sin senatende pri la maristaj fondaĵoj. « Por la altsentaj animoj, diris S-ro de Foville, kies emo estas respondi al la voko de la suferantoj tiom pli diligente, kiom tiu voko venas de pli malproksime, la senagema sezono neniam estas longe-daŭra ! »

Mi jam rakontis, antaŭ du jaroj, la malamindajn malhelpaĵojn



suferitajn de la gastama oficaro de la maraj fondaĵoj, dank' al la ruiniga sinabsteno de la tiama maraĵa ministro. La malfeliĉaj fiŝkaptistoj ne havis hospitalŝipon en 1903'. La konsilantaro de a maraj fondaĵoj sin riskis tute repreni sur sin la servadon, kaj rekondukis en « Faskrudsford' on » la francajn religiajn malsanulistinojn, pri kiuj juna malsanulo diris: « Kun ili, ne estas tiel malĝoje morti en Islando. » De tiu tempo, oni ordigis, flanke de la malsanejo, familian domon kie la maristoj trovas koran akcepton kaj trompas la forestadon parolante pri la « lando ». Tiuj maldelikatuloj ofte havas tre ameman koron: » Ĉu mi ne vidis, rimarkas S-ro de Valence, unu el ili kiu, renkontinte islandanan infanon, kisis lin kun kortuŝeco, poste, ekvidinte ke mi atente rigardis lin, simplanime diris al mi: Tio memorigas min pri la miaj! » kaj tiu malfeliĉa tifusulo flegita en la hospitalo, kiun oni demandis: « Ĉu vi ne enuas tie ĉi, la tutan tagon? » kaj tiu respondis: » Ho! ne. Mi pensas pri miaj fratinoj kaj mia patrino; mi estas hejme la tutan tempon! »

Post Ĥinuĵo, post Tero-Nova, post Islando, S-ro de Valence organizis en Tulon'o, en 1904', la rusan Ŝipon « Orel » kiel milithospitalo per la elspezoj de la franca Ruĝa-Kruco. Oni ne kalkulas plu liajn paroladojn por la profito de la maraj fondaĵoj, kaj li estas nun, de kelkaj monatoj, ĝenerala sekretario de Ruĝa Kruco. Lia famo estas fondata ĉe la malriĉuloj; kaj la ĉifonistoj de « Saint-Ouen » por kiuj malŝpareme li donis sin, post la brulado ruiniginta ilin, diris al S-ro de Foville: « Ha! tiu homo estas bona b...! » « La laŭdo ne estas sufiĉe akademia, aldonas S-ro de Foville, por ke mi povu ĝin proprigi al mi. Ni kontentiĝu diri pri S-ro de Valence, ke li estas la disdonemo homiĝita. »

Eltiraĵo el la monata kroniko: « Farajoj kaj homoj » verkita de Eduardo Trigan.

El *Le Correspondant* (25 dec. 06) Esperantigita de Vo-Po-Lo.

## KATOLIKISMO EN CENTRA OCEANIO

(Interparolado kun Lia Episkopa Moŝto Olier, apostola Vikario ĉe la Centra Oceanio.)

— Nu! via episkopa Moŝto, vi konas en via lando la perfektan unuiĝon de l'Eklezio kun la Ŝtato?



Tiel mi demandis iom ridetante Lian episkopan Moŝton, Sinjoron Olier, apostolan Vikarion ĉe la Centra Oceanio ; jes, ridetante, malgraŭ la doloriga penso kiun elvokis mia demando. Sed kiel ne rideti kiam oni sin turnas al tiu afabla, ĝoja homo, je sprita okulo kaj aminde malica buŝo. S<sup>o</sup> Olier estas filo de tiu Sud-okcidenta Francujo, kiu nescias senkuraĝecon. Obstina grava laboro ne estingas ĉe li la raketojn de l'amuzaĵ vortoj. Kiam tiaj homoj sin dediĉas al apostoleco, ili dekfoje rekomenkos la detruitan verkon, ŝercante pri siaj propraj malsukcesoj... Ili ne estas « malĝojaj sanktuloj »... Kaj la forlogantaj notoj de l'nacia milita trumpeto ŝajnas ĉiam resoni en iliaj koroj.

S<sup>o</sup> Olier respondis al mi : Tre certe, en la insulo Wallis kaj en la insularo Futuna, l'unuiĝo inter Eklezio kaj Ŝtato estas tiom plenumita kiom oni povas deziri ĝin. Tie neniam konflikto, sed reciproka konfido, tutkora familiemo... La loĝantaroj de la Wallis kaj Futuna estas nepre katolikaj.

— Wallis kaj Futuna. Vi demandas vin eble kien mi vin allogas. Auskultu la jenon : Je 40 tagoj de Marseille, 15 tagoj de Sydney, inter la insuloj ŝtupiĝantaj de la 175<sup>o</sup> ĝis la 179<sup>o</sup> grado de okcidenta Pariza longo, kaj de la 12<sup>o</sup> ĝis la 22<sup>o</sup> grado de Suda larĝo, sub temperaturo malofte malpli 15<sup>o</sup>, neniam pli ol 36<sup>o</sup> grada ; tie, inter la kokos, banan, panarboj, la naturo estus vera patrino al homo se tiujn insulojn ne ruinigus periode teruraj ciklonoj. Sub tiel favora ĉielo, vi diros, la moroj estas kredeble tre dolĉaj ?

Ne, kara leganto, ĉar antaŭ ol la Pastro Bataillon alvenis la Wallis-insulojn, en la 1837<sup>o</sup> jaro, malmultiĝis la loĝantoj pro senĉesaj militadoj, pro hommanĝo, pro familia malfirmeco ; kaj same estis en la insuloj Futuna, kiam tien aliris la saman jaron la feliĉegulo Chanel.

Kio do okazis de tiam ? P. Bataillon — poste Lia episkopa moŝto Bataillon — laboradis kvardek jarojn en la insuloj Wallis meze de nedireblaj penadoj kaj seniĝoj ; la feliĉegulo Chanel estas mortigita post tri jaroj en la insuloj Futuna kaj tiu morto tuj estis fruktodona. Sed hodiaŭ la Wallis enhavas 9 misiistojn kaj 24 religiulinojn ; dek preĝejoj tie starigas siajn stonajn turojn inter la foliaro-tegmentaj dometoj.

## — Patriarka vivado.

Tie, daŭrigis S<sup>o</sup>-Olier, la societa regado estas feŭdala, sed patriarka pro kristanismo. Oni ne konas ankoraŭ la fakojn de la privata propraĵo. La Ĉefaŭtoritato multe similas en ĉiu vilaĝo la patran aŭtoritaton. La tero estas fruktodona kaj la bezonoj ne multaj: kokonuksoj, ignamoj, kaj bananoj sufiĉas por la kutima nutrado. La porka viando estas la manĝaĵo de l'festoj. La radikoj de l'*piper methysticum* igas trinkaĵon; la ŝelo de l'*niapo* donas vestojn, kiel ankaŭ la fibroj de l'*pandanus*.

En tia varma kaj malseka atmosfero ne tolereblaj estas niaj ŝtonaj domoj. Kelkaj palisoj terefiksitaj, kun ilin kunigantaj laŭlarĝaj tabuletoj, teraj muroj altaj apenaŭ du futojn, tegmento kunmetita per grandaj kaj fortikaj panarbo-folioj, foliaraj rulkurtenoj, jen la tuta arkitekturo de tiuj primitivaj dometoj... Niaj preĝejoj mem ne konvenas al postuloj de tiu tropika ĉielo. Se mi devus ilin rekonstrui, mi ne fervorus certe kiel Monsinjoro Bataillon por faĉeti la ŝtonojn; mi altigus ilin tute per kolonaroj kovritaj per fortika *velumo*, kaj moveblaj tapetoj anstataŭus la murojn.

— Se la nuna regado de la Wallis kaj Futuna estas antaŭ ĉio patriarka, mi imagas, via Episkopa Moŝto, ke tiu ja malpreciza organizado determiniĝas laŭ la respondecoj kiujn difinas la praktikado de la kristanaj virtoj?

— Jes, sed antaŭ ol antaŭeniri plue ni devas rimarkigi ke la sento pri la propraĵo ne estassama tie kiel en Eŭropo. Nenia intersanĝo por vere diri, inter la enlanduloj. La nombro de la aferoj kiujn ili bezonas estas tre malgranda, kaj ili ne seniĝas je tiuj. Ne permesite estas rifuzi al iu ajn, kion tiu petas. Tial tre grave estas ke la aŭtoritato estu kunigata kun vera justeco. Se la respublika regado postulas plejgrandajn virtojn en la popolo, la patriarka regado plej multajn ecojn postulas en la estroj.

Tion ekkomprenas niaj bonuloj. Antaŭ nelonge unu el precipaj ĉefoj estas demetita de l'popolo; li malbone edukadis siajn infanojn, kaj tiel komprometis la estontecon. Oni prizorgas same la juĝadon, kaj Sankta Ludoviko retrovus ĉe ni la kverkon de l'Vincen-arbaro. Ĉiudimanĉe, post la meso, granda

kunveno kontraŭ la preĝejo. La leĝomankoj estas juĝataj kaj punataj. Du punoj nur : mona puno, porko ; aŭ la punlaboro sur la vojoj.

— Kial do, Episkopa Moŝto, kvankam vi havas tiel fidelan popolon en la Wallis kaj Futuna, vi restadas tamen en la insuloj Tonga ?

— Oceania civilizacio.

La episkopa loĝado tie estas kie plej necesas laboro. La Tonganoj akceptis, en 1825<sup>a</sup>, la protestantismon. — Akceptis... la vorto estas ja malĝusta.

Juna ĉefo, Taŭfa-Alaŭ, fariĝis aliĝanto de protestanto Thomas kaj li fondis sian religion en la insularo kune kun sia absoluta povo ; li estas nomita la « reĝo Georges ».

Unu vilaĝo (tiu de Pea) kontraŭbatalis lin longe, kaj konservis sian idolservadon... Inter la Pealoĝantoj unuajn varbitojn trovis la P. Chevron, samtempulo kun la P. Bataillon kaj la feliĉegulo Chanel.

Sed por aŭtokrate regi, reĝo Georges estas devigita rompi la personajn fideleco-ligilojn, inter siaj regatoj kaj iliaj lokaj estroj, elvenintaj el la nedividebleco de l'propraĵoj kaj naskantaj veran feŭdalecon ; li fondis tiumaniere perforte, la priva'an proprecon, privatatan specialan proprecon, sed tre lerte elpensitan.

La tero de l'insuloj Tonga taŭgus efektive por elnutri multe pli da loĝantoj ol ĝi nun enhavas ; ĉiu familio ricevas terpecon por si mem ; kaj pli malfrue kiam ĝiaj idoj edziĝas, ĉiu el ili ricevas ankoraŭ parton deprenitan el la komunaj nedividitaj teroj.

— Jen tio estas tre interesa, Episkopa Moŝto. Via reĝo Georges donis al Tonganaj familioj proprecan regadon tre similtantan tiun de Fort-Mardyck. Vere ni povus en tiu rilato kelkajn lecionojn akcepti de Tonganoj. Ĉu, de kelkaj jaroj, la nombro de l'taglaboristoj posedantoj ne malplimultiĝis en Francujo de 1.200.000 ĝis 500.000 ? — 700.000 familioj, 3 milionoj da uloj suferis aliĝon pro kiu ili povus envii Tonganajn viajn « Sovaĝulojn ». La *Terpeco kaj Fajrejo* celas precize naski ĉe ni progreson similigontan nin al loĝantoj de l'Centra Oceanio.

— Mi tre deziras ke viaj ambau ligoj rapide trafu sian celon. Mi redaktis mem Tonganan gazeton, kiun miaj lernantoj kompostas kaj presas. Ĝi havas tre poetan titolon kaj eliras ĉiumonate. Ĝia nuna direktoro estas la filo de l'admiralo Blanc, la Pastro Joseph Blane. Eĉ mi tion tutnallaŭte diras, mi redaktis kaj direktis l'oficialan ĵurnalon, ĉiumonatan kiel la mia, kaj same senpagan. La vivo de tiu oficiala ĵurnalo estis mallonga. Nu! la Tongana gazetaro multe superis la grandan Eŭropan gazetaron pro tio ke ĝi ne estis skandalgazetaro!

— Vi detruas ĉiujn niajn antaŭjuĝojn, Monsinjoro, sed la misiistoj kutimas nin mirigi pro siaj iniciatoj. — Kia estas nuntempe la stato de l'katolikismo en la insulo Tonga?

### Katolikoj kaj protestantoj

Eklezio kalkulas 3000 fidelulojn, tio estas la sesono de la tuta insula loĝantaro.

Katolikoj kaj protestantoj interesiĝas treege pri la religiaj disputadoj. Mi ne mirigos via dirante, ke en niaj insuloj, la protestanta varbado precipe vivadas per kontraŭparoloj pri la katolikismo, en kiu instinkte Tongano divenas plenan kaj sendifektan kristanisman.

En niaj katekismoj, kiuj estas *alpha* kaj *omega* de nia apostolado, ni invitas niajn junulojn klarigi kiel eble plej forte la kontraŭdirojn kiujn ili aŭdas pri sia religio.

Al tiuj kontraŭparoloj ni donas la respondojn, kiujn avide kolektas niaj lernantoj. Ĝi estas semo, kuin ili poste disŝutas fervore kaj inteligente en siaj interparoladoj.

— Pli kaj pli bone, Monsinjoro. Vi ne kontentiĝas pri ĵurnalismo. Viaj katekismoj ne estas nur klasoj, sed veraj kunvenoj pri religiaj studoj.

— Via miro min ĉarmas, rediris la episkopo misiisto. Mi tuj ankoraŭ pligrandigos ĝin aldonante ke ni ne tute nescias la kontraŭdirajn konferencojn. La katolikaj misiistoj, kaj precipe ilia episkopo, estas multe ŝatataj de la protestantaj Tonganoj. Se okaze ni trairas unu el iliaj kunvenoj — kaj tiaj okazoj ne estas maloftaj, ĉar la kunvenoj fariĝas plenaere — ni prezentas demandojn, rimarkojn, kontraŭparolojn, ni helpas unuvorte la

aŭdantojn kompari la protestantan kristanismon kun la kato-  
lika, kaj ideobato tia naskas lu mon,

**Katolikismo sola**

— Ĉu katolikismo vidiĝas nepre supera, ne rilate al protes-  
tantismo, sed ankoraŭ al ĉiuj aliaj civilizaj kaŭzoj ?

Tre evidente. — Mi ne sciigos al vi ke la filozofaj aŭ religiaj  
dogmaroj naskas la moralon en la homa privata kaj sociala  
vivo ; vi scias ke la moralo enhavas la esencajn leĝojn de  
l'homa konservado. La higienistoj diras pri l'homa individuo  
ke « ĝi ne mortas, ĝi sin mortigas » per siaj nesingardemoj,  
malmoderaĵoj aŭ malvirtoj. Sed la raso, pli ol individuo,  
bezonas por persisti tutan obeon al diaj leĝoj. Sube de ia  
nivelo, ĝi detruigatas sociale perforte, ĝi senfruktigas fiziologie  
malvirte. Nu ! nenia homa forto redonis iam al popolo aŭ raso  
la elĉerpitajn vivmoralajn riĉecojn, nenia homa religio aŭ filo-  
zofio redonis iam la rilatan ĉastecon, kiun implikas la edziĝ-  
firmeco aŭ fideleco.

Tion nenio redonis se ne la kristianismo sincera, kuraĝa..  
Se la protestantismo do ne povas relevi tute tiun rason, tro  
malfortiĝintan morale, ĝi devenas el tio ke ĝi nur konservis  
mem malriĉiĝitajn energiojn. — Tiel, en Polinesio, la pro-  
testantismo prokrastis ruiniĝon de kelkaj popoloj malfortiĝan-  
taj pro militado kaj hommanĝemo ; sed ĝi ne sukcesis hal-  
tigi la malgrandiĝantan naskecon. Kial ? La protestantaj pas-  
troj ne kuraĝas, — kaj kredeble ne povas — eligi la eksedziĝon.

Male, niaj katolikaj familioj multiĝas, tial ke ili estas firmaj,  
moralaj — kaj tion oni povas ĉie konstati.

— Sed, Episkopa Moŝto, ĉu via tasko limiĝas inter la insuloj  
Wallis kaj Tonga ? Ĉu vi ne ekvidas ekster tiuj, aliajn apos-  
tolajn almilitojn ?

— Jes Nord-okcidenten de mia vikariejo troviĝas la insuloj  
Éllice, enhavantaj 7000 loĝantojn. Oni petis min antaŭnelonge  
pri misiistoj. La tuta loĝantaro volonte ricevus katolikismon.

— Sed ?

— Sed oni bezonas monon, homojn. Ni estas tro malmultaj.

— Tamen ŝajnas ke la Providenca horo sonis por tiuj insuloj; Vi tie altuŝas plej koran fibron mian.

— Mi finos per unu vorto. — Kial viva Franca Societo, prizorganta konservi niajn grandajn tradiciojn, ne anstataŭus la oficialajn helpojn, ĉiam pli malfoftajn?.. Oni povus imiti la Italan societeton, kiun prezidas episkopo Schiapparelli, kaj penadi por konservi al Francujo la unuan vicon en la Oceania civilizacia laborado.

Laŭ Ĵurnalo *La Croix*, esperantigis Pierre DESCHAMPS.

## Pastro de Dio

La tagon de mia sepdeka jaro : (19 Dec. 1904) mi rememoris la maljunan Pastron, kiu min baptis kaj min tre amis. Sekve mi meditis la gracojn, kiujn la bona Dio al mi donacis per sia pastro. Versaĵo *Pastro de Dio* estas frukto eble tro verda, de tiu meditaĵo. (E.-J. W.).

Pastro de Dio, vin amas mi,  
Kiam, al Kristo sur monto simila,  
Vi predikas la leĝon de l'Evangelio.  
Vi glorigas la virton, ekscitas al pento,  
Instruadas la veron kaj montras la vojon,  
Kondukantan al vivo eterna.

Pastro de Dio, vin amas mi,  
Kiam naskiton vi baptas solene.  
Sur la kapon verŝante sanktakvon « En nomo  
De la Patro, de l'Filo, de l'Sankta Spirito »,  
El l'animo vi lavas makulon Adaman  
De l'Anĝeloj ĝi estas nun frato.

Pastro de Dio, vin amas mi,  
Kiam kunvenas kun vi l'infanaro.  
Vi klarigas tre simple la Dian dogmaron,  
« Nia Patro, Saluton, Mario » preĝigas.  
Laŭ ekzemplo de dolĉa Jesuo vi diras  
« Lasu veni al mi la etulojn »

Pastro de Dio, vin amas mi,  
 Kiam ni pente konfesas la pekon.  
 Vi ricevas favore la filon maldankan,  
 Revenantan en domon de Patro amanta;  
 Vi admonas lin dolĉe, konsilas lin bone,  
 Kaj pardonas tutkore la ŝuldon.

Pastro de Dio, vin amas mi,  
 Kiam al Patro vi Meson oferas.  
 Mi admiras potencon de via parolo,  
 Kiu vere la panon kaj same la vinon  
 Aliigas en korpo kaj sango de Kristo,  
 Nun spirita nutraĵo de homo!

Pastro de Dio, vin amas mi,  
 Kiam vi Panon anĝelan disdonas.  
 Al Sinjoro vi min unuigas intime,  
 « Li ripozas en mi kaj en Li mi ripozas »;  
 Mi adoras humile, mi dankas fervore,  
 Mia koro flamiĝas per amo!

Pastro de Dio, vin amas mi,  
 Kiam vi festas en stratoj de urbo  
 Ornamitaj per floroj kaj tutlumigitaj,  
 Procesion triumfan de Reĝo de l'reĝoj.  
 Kun Ĉielo ni kantas la « Sankta trifoje! »  
 Kun Hebreoj la gajan « Hosano! »

Pastro de Dio, vin amas mi,  
 Kiam, en nomo de Ĉiopovanto,  
 Sendisiĝe vi ligas edzinon kun edzo.  
 Vi alvokas sur il'n la benon ĉielan,  
 Por ke ili feliĉe, paceme kunvivu  
 Kaj infanojn eduku laŭ Dio.

Pastro de Dio, vin amas mi,  
 Kiam vi portas la Eŭkaristion  
 Al kristano malsana kaj lin sanktoleas.



Vi konsolas kompate, pacigas la koron,  
Malpliigas doloron, forigas la timon,  
Kaj malfermas por li la ĉielon.

Pastro de Dio, vin amas mi,  
Kiam vi tombon kondukas mortint n  
Kaj, benante la ĉerkon, petegas « Sinjoro,  
Al li donu ripozon en lumo senĉesa ! »  
De naskiĝo ĝis morto, eĉ transe la tombo,  
Vi forlasas la homon neniam !

Loven (Louvain), 19<sup>o</sup> de Decembro 1901.

E.-J. WEEMAES.

## KATOLIKISMO KAJ SOCIOLOGIO

« Konsiliĝu kun la nuntempaj kaj ĉiulandaj katolikoj, malfermu enketojn kiel tiu, kiun ĉi tie mem <sup>1</sup> publikigis fortika kaj senpartia ortodokso ; vi notos du emojn.

Unuj, la sociologiistoj, okupataj pri la tera estonteco, sekvas nian nunan evolucion per amikema okulo. Ilia instinkto volonte unuigas al la programoj de tiu ĉi malsupra mondo la ordonojn de la supraj transejoj. Ilia « civismo » ne kontraŭdiras ilian diamemon. Ili komparas la kredon kaj la epokon. Por plibonigi la leĝarojn, ili malfermas Evangelion, serĉas en ĝi, kun savo por la animoj, regulon por la modernaj popoloj kaj sekreton por direkti la estontajn ŝanĝiĝojn. Se oni kredas ilin, la dia libro, neŝanĝebla dogmo kaj sankta moralo, alion ankoraŭ enhavas ; al la okulo atentega, ĝi malkaŝas aron da homaj leĝoj, plenan politikan ekonomion, kiun liberigi kaj publikigi necese estus.

Pri tio, de la tempo kiam mi ekzistas, sed precipe de kelkaj jaroj, mi aŭdis aŭ legis multe da frazoj, unuj elokventaj, aliaj inspirantaj, unuj seriozaj, aliaj verŝajnaj. Kelkafoje enmiksiĝas formuloj, kiuj maltrankviligas min « Jesu-Kristo estis la unua respublikano en la mondo, la unua demokrato, eĉ la unua socialisto. » Pri tio, kredeble, ne ŝanceliĝante, oni de-

<sup>1</sup> En Ĵurnalo *La Croix*.

vas respondi : Ne ! Jesu-Kristo estas nek respublikano, nek reĝano, nek eĉ, propreparolante, ekonomiisto aŭ lēgdonanto ; Jesu-Kristo estas Jesu-Kristo, tio estas Dio, kiu, tuj kiam li elmontras sin, evolucias malproksime de la malnecesaĵoj, laŭ la plano de Absoluto. La ruzuloj, volontaj ke li politike parolu, perdis sian ruzon kaj sian klopodon : « Mia regno ne estas en tiu ĉi mondo... Redonu al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro .. » jen estas lia opinio pri la fisko kaj la konstitucio.

Mi konas senartifikajn cerbojn kiuj, kompleze, pliampleksigas la respondon kaj kion ĝi inspiras. Ili konstatas evidentajn.

La voĉo de la katolikismo estas la voĉo de Bossuet'o : Vivu Eternulo ! Kaj oni malutilas al Eternulo kiam oni alligas lin al la pereemaĵo. Nenio pereiga kiel la pretendo de jarcento doni Neŝangeblon kiel fundamento al ĝiaj ŝangeblaĵoj. La ĉiela urbo, ŝirmita kontraŭ la ruinoj, restadas fremda je la riĉaj kaj homplenaj urboj, kiuj plenigas unumomente la universon per la frakaso de siaj trumpetoj kaj la tumulto de sia gloro, kaj kies poste, la scienculo, kurbiĝinta al ilia polvo, penas por trovi la restaĵojn. Tiuj urboj obeas, kaj devas, por daŭri unu momenton, obei al io rilata, al io provizora ; ili reguligas laŭ sia povo, sian malgravan transiran vivon ; kun iliaj mallongaj sagacoj, ni ne miksu la ĉielajn vidadojn. Nek la trono, nek la tribuno devas konfiski la altaron. Eklezio estas feŭdala, reĝa, respublika, aristokrata, demokrata ; laŭvice Eklezio estas plene tio, tial ke ĝi estas nenio el tio. Ĝi suferas niajn ŝangeblajn markojn, ĝi ne ilin dediĉas,

Jes, sed simila konstato, se oni haltas en la vojo, malbone kontentigas multe da spiritoj avidaj por trovi leĝarojn en la komparoj. Kaj ili, ankaŭ, iamaniere estas pravaj. Evangelio ne estas leĝaro, sed Evangelio kreas instinktojn de ia ordo ; kaj kiaj estas la homaj leĝoj, se ne leĝigitaj instinktoj. La leĝoj publikigas la inklinojn kaj la inklinoj devenas el la religioj. La leĝoj rebrilas la animojn, kaj la animoj, kredojn. La kredoj, definitive regas do la leĝojn. Diru al mi kion vi dekretas, mi diros al vi kion vi kredas.

Nu kion dekretus la plena, la logika florado de la kristana

kredo, la plena kristanismo, la integrala kristanismo? Tutan socialan planon, kaj tiu ĉi plano estas demokratika, se nur tiu vorto signifas la fratecon efektivigitan tere por la profito de la malpotenculoj, de la humiluloj kaj de la malfortuloj, kiujn pistas la muelilo de la vivo.

Ni konfesu tion Evangelio ne estas la libro de la riĉuloj; ĝi kondamnas tion, kio dividas la klascjn, la elementojn de popolo. Ne do postulu ke la kristana kredo benu la malmoderaĵojn de la ekonómistoj la kruelan sciencan de falsaj liberecantoj, la tro-grandigitan kulton de l'individualismo, kiu estas nur egoismo iĝita superstiĉo, la fetiĉan respekton por la leĝo de l' « prezentokaj postulo », agrabla rimedo uzita de kelkaj por ĉiam postuli kaj neniam « prezenti »!

Cetere la kristanismo ne benas ankaŭ la lukson kaj la brilon de la luksegaj alvenistoj. Ĝia kredo sin montras precipe kiel nutritisto de popolamasoj. Jam, ĉe la bordo de lago, gesto de Jesuo ĝin sidigis, kiam sonis la horo de l'manĝado. Se ne la povon, ni heredis la instruaron ni memoru la geston. Tiun ĉi geston, vole ne vole, kiu ajn provas, faras kristanismon; li faras kristanismon, kiel S-ro Jourdain, ne sciante, faris prozaĵon.

Pri tio, nenio kurioza kiel la laboro leĝiganta de nia S-ro Jourdain radikal-socialisto. Ĝi implikas nekomprenoblan kontraŭdiron. Liaj plej novaj ideoj resupreniras ĝis la XII<sup>a</sup> jarcento, la bona iama tempo kiun multe da personoj laŭdegas, ĝin ne ĝuste konante.

Kiom da fojoj la socialismo estas nur kristanismo kun la amo malplie kaj plie la ribelo, kristanismo kun la galo destruanta, anstataŭ la sango elacĉetanta!

Al ĝiaj programoj mirinde taŭgas la konstato de verkisto: « Tie oni elĵetas Evangelion, sed per ĝi oni vivas! » Jam, en 1872, en verko tro malmulte legita, la grafa Moŝto de Gasparin substrekis tiamaniere la kristanismon nekonsentan, kiu kuŝas en la fundo de nia moderna societo. Li diris « Jesu-Kristo konigis mirindajn verojn, kiuj al ĉiuj profitas, eĉ al kiuj militas kontraŭ Jesu-Kristo. » *Precipe* tiuj, kiuj militas kontraŭ Jesu-Kristo, li signifis per tiuj linioj Evangelio « ka-

# ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Šviesa“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siųsti reikia pašto adresu: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

## Vilniaus lietuvių Rinkimų Komiteto atsišaukimas.

Mēs kaip ir visų kitų viešpatystės kraštų gyventojai, dalyvaudami rinkimuose į viešpatystės Seimą (Dūmą), turime rūpintis, kad Lietuvos atstovais būtų išrinkti tokie vyrai, kurie mokėtų Seime priderančiai apginti visus mūsų tautos ir mūsų krašto reikalus.

Todėlei mēs, Vilniaus lietuviai, ateinančiuose rinkimuose patariame ir visiems kitiems lietuviams:

1) Visur į rinkėjus skirti gerus lietuvius, apšviestus ir protingus vyrus, pažįstančius gerai tautiškus, ekonomiškus ir kultūriškus mūsų Tėvynės Lietuvos reikalus.

2) Lietuvos pakraščiuose, kur lietuviai gyvena mišriam su kitomis tautomis, ypač su gudais (bielorusais), patariame susitarti su savo kaimynais gudais ir kitais iš savo tarpo skirti rinkėjais geriausius savo žmones, kurie, kaip vienos, taip ir kitos tautos, reikalus gintų.

3) Lietuvos miestuose ir miesteliuose, kur lietuviai mišriam su svetimtaučiais gyvena, eiti išvien su ta tauta, kuri, kaip lietuviai, yra darbo žmonės, demokratai, kurie nėra priešingi lietuviystei, kurie gyvenime ir politikoje stengiasi įvykdyti demokratiškus principus.

4) Rinkimuose nesusidėti ir nebičiuoliauti su vadinamaisiais „Lietuvos lenkais“ („Palacy na Litwie“), kurie kaipo dvarponiai, valdo daug Lietuvos žemes, bet priguli daugiausiai prie „Tautiškosios lenkų partijos“ (Narodowa Demokracija) yra mums svetimi ir didžiausi Lietuvos žudytojai-lenkininkai. Lietuviai, elgkimes išmintingai ir atsargiai! Rūpinkimės mūsų Tėvynės Lietuvos reikalais!

Vilniuje, Lapkričio mėn. 1906 m.

*Vilniaus Lietuvių Rinkimų Komitetas.*

## **Svārbiausieji atsitikimai.**

Vidaus dalykų ministerio draugas Gurko padarė sutartį su Petrapilės pirkliumi Lidvaliu, kad tasai pristatys 10,000,000 (dešimts milijonų) pudų rugių į badaujančias Rusijos gubernijas po 85 kap. liepė duoti Lidvaliui 800,000 rublių. Lidvalis prisiimė būk tai pristatyti tuos rugius ne vėliau Sausio 1 d. 1907 m., jeigu gi nedastatytų, prisižadėjo neva užmokėti štro po 10 kap. nuo pučo. Bet pasirodo, kad p. Lidvalis visai nesirupina pildyti savo sutarties, dastatė, tiesą, vienon vieton 500 vagonų rugių, bet tokių, kad ten jų nei nepriėmė. Lidvalis, pagalios, visai neužsiima rugių pirkliavimu, bet taiso vandentraukius ir vaterklozetus

(išeinamas vietas) ir laiko Petrapilės kortų lošimo namus ir „linksmąsias vietas“.

Apart gi skolų nieko savo kasoje Lidvalis ir neturi, tatai ir nepristatys tų rugių, nei atiduos valdžiai tuos paimtus 800,000 rublių. O žmonės gi galės sau mirti badu. Dėlei tos priežasties visi laikraščiai labai užsipuolė ant Gurkos, da-gi visi ministeriai ir pats Stolipinas reikalauja, kad Gurko atsistatytų, nes jiems neva didžią gėdą padaręs. Caras liepė tą visą dalyką gerai iš-tardyti.

## Žinių-žinėlės.

**Vilniuje.** Už dviejų savaitių išeis pirmas numeris naujo lietuviško laikraščio vardu „Lietuvis“. Eis jis tuo tarpu kartą į dvi savaiti. Kaina metams 2 r. Rašoma bus jame apie visuomenės, mokyklos, mokytojų ir apšvietimo reikalus. Redaktorius leidėjas Dr. J. Basanavičius. Pinigai ir rankraščiai „Lietuviui“ siunčiami šiuo adresu: Vilnius, Stefanovskij forštadt, Urbanavičiaus namai, Pr. Klimaičiui. Laikraštis žada būti svarbus, rimtas ir radikališkas.

— Pagal senato skaičiaus, išbraukta iš balsuotojų skaičiaus 1457 darbininkų ir 321 gelžkelio tarnaujančių.

**Petrapilis.** Ministerių taryba išleido aplinkraštį, kuriomi draudžia visiems, kurie užima valstybės vietas, priklausyti prie politiškujų partijų, išsibraukti iš partijos sąnarių skaičiaus. Tasai aplinkraštis palytėjo daugelį valdininkų ir sukėlė jų tarpe didelį nepasikakinimą ir daug protestų. Taip, Maskvos gubernijos žiemiečių valdybos pir-

mininkas Golovinas ir valdybos sąnarys Čelnokov'as nutarė, kad jokių būdu neišeišią iš „žmonių laisvės“ partijos, prie kurios priklauso, jie velyk atsisakysią nuo užimamų vietų, bet tik nepaklausysią to ministerių tarybos nutarimo, kurs pagal jų yra pasikėsinimu prieš piliečio tiesas. Juodu nori sušaukti žiemiečių ir juristų susirinkimą, kad aptarti tojo aplinkraščio neteisingumą (**nezakonnost**). taip-pat Maskvos sątaikos teisėjei, priklausantieji prie politiškujų partijų nutarė velyk pasišalinti nuo savo vietų. negu išeiti iš partijų, prie kurių priklauso. Ministerių taryba, auot jų nusprendimo, išleidusi tokį neteisingą aplinkrašti, prasižengė prieš pamatinius Valstybės įstatymus, kurie sako, jog piliečio tiesų apribavimas galimas, tik carui paliepus arba nutarus teismui.

**Varšava.** Išbraukta iš balsuotojų skaičiaus 20,000 darbininkų samdančiųjų butus, daugiausiai lenkų. Tas labai sustiprino Varšavos gyventojus—žydus visose nuovadose, o vienoje, kur pernai jų buvo mažuma, dabar žymiai perviršijo lenkų balsuotojų skaičių, šešiose nuovaduose su 43 rinkikais balsų dauguma priklauso žydams, kitos-gi šešios nuovados, kur dauguma yra lenkų 37 rinkikus. Nuo darbininkų tik 3 rinkikai. Tokiu būdu daugiausiai lenkai gali gauti balsų 40 renkant atstovą nuo miesto, o žydai 43, trimis taigi daugiaus. Galima tatai dabar labai, kad nuo Varšavos atsovaus Dūmoje žydas, ko taip bijosi lenkai tautiečiai (endekai), nors jie ir sakosi jokių būdu neleisią į Dūmą nuo Varšavos miesto žydo.

---

Redaktorius ir leidėjas kunigas Juozupas Ambraziejus.

~~~~~  
M. Kuktos spaustuvė. Dvorcovaja, 4.



ŝita » tiamaniere agadas en la mondo, ke iafoje, ĝi estas pli bone komprenita, laŭ kelkaj rilatoj, de tiuj, kiuj obeas ĝin ne sciante, ol de kiuj ĝin profesie akceptas ».

Jen estas noblaj sincerecoj. Ni laŭdu la fervoron de niaj junaj sociologiistoj, anstataŭ ol tremi pri niaj monuoj, vidi nur ruinan fantomon en la febra marŝado de la malsupra societo, kiu supreniras; ni malkovru al ĝi, per larĝa gesto, la fonton de ĝiaj programoj, la kaŭzon de ĝiaj almlitoj, la signon de ĝiaj progresoj, kaj la garantiaĵon de ĝiaj venkoj. Ni ne lasu la Logiojn monigi nian metalon. Ni reprenu la evangelian oron; kaj sur la estonta medaliono ni gravuru la dian figuron de l'krucumito.

Emile de SAINT-AUBAN.

Laŭ ĵurnalo *La Croix*, esperantigis Vo-Po-Lo).

## LA PROVIDENCO

(el La Mennais)

Du homoj estis najbaroj, kaj ĉiu el ili havis edzinon kaj multajn infanojn; ili havis nur sian laboron por vivigi ilin. Unu el tiuj homoj maltrankviliĝis dirante se mi mortus aŭ malsaniĝus, kio fariĝus pri mia edzino kaj infanoj? Tiu pensado ne forlasis lin, kaj mordetis sian koron, kiel vermo morde'as la frukton en kiu ĝi estas kaŝita.

Ĉar ankaŭ la sama penso egale estis alveninta al l'alia patro, li tute ne atentis pri tio. Li diris: Dio, kiu konas ĉiujn estaĵojn, kiu zorgas pri ili, ankaŭ zorgas pri mi, pri mia edzino kaj miaj infanoj. Tiu-ĉi vivadis kviete, dum la unua ne ĝuis momenton da ripozo, nek interne ĝojon.

Iafoje, kiam li laboris sur la kampoj, malĝoja kaj senkuraĝa pro sia timo, li vidis kelke da birdoj enirantaj kaj elirantaj en arbetaĵon, pos'e baldaŭ tien revenantaj.

Alproksimiĝinte li vidis du nestojn metitajn flanko, ĉe flanko, kaj en ĉiu el ili multajn birdetojn nove naskitajn, ankoraŭ simplumajn.

Kiam li estis foririnta al sia laboro, tempo post tempo, li levis

siajn okulojn, kaj rigardis tiujn birdojn, kiuj irante kaj venante disdonis nutraĵon al iliaj etuloj.

Malfeliĉe, kiam unu el la patrinoj eniris kun sia p'enbeketo, vulturo kaptis ŝin, forprenis ŝin, kaj la kompatinda patrino vane baraktis sub lia ungego, eljetante akrajn kriojn.

Vidante tion, la homo, kiu laboris, iĝis pli malkvieta ol antaŭe; ĉar li pripensis: kredeb'le la morto de l'patrino estos la morto de l'infanoj. La miaj havas nur min kiel kelpon, ĉio fariĝus pri ili se mi mankus al ili? La tutan tagon li estis malgaja; dum la nokto li tute ne dormis.

La morgaŭan tagon reirante sur la kampojn li diris al si: « mi volas vidi la etulojn de tiu kompatinda patrino; sendube multaj el ili jam mortis. » Li paŝadis al la arbetaĵo kaj rigardante li vidis la etulojn tute sanaj: neniu ŝajnis suferinta.

Tio ĉi mirigis lin; li kaŝiĝis por observi tion, kio okazos.

Mallonga post tempo, li aŭdis bleketon kaj ekvidis la duan patrinon, alportantan rapide nutraĵon, kiun ŝi rikoltis, kaj ŝi disdonis ĝin al ĉiuj etuloj, ne elektante kian ajn. Ĉiuj havis nutraĵon kaj la orfoj ne estis forlasitaj pro sia mizero.

La patro, kiu malfidis al la Providenco rakontis vespere al l'alia patro tion, kion li estis vidinta, kaj tiu ĉi diris alli: « Kial maltrankviliĝi? Neniam Dio forlasas la siajn. Lia amo havas sekretojn, kiujn ni ne konas. Ni kedu, esperu, amu, kaj daŭrigu pace nian vivadon.

« Se antaŭ vi, ni mortos, vi estos la patro de miaj infanoj; se antaŭ mi, vi mortos, mi estos la patro de l'viaj.

Se ambaŭ ni mortos antaŭ ol ili estos en ago provizi sin mem pro siaj bezonoj, ili havos kiel patro, la Pa'ron, kiu estas en la ĉielo. »

Tradukis: ELEDA.

---

## VESPERO DE BELA TAGO

La paroĥestro estas sesdek-kvin jara; firma kaj altakreska maljunulo, fortika kiel siaj ŝtonegoj, rekta kaj kvadrata kiel la turo de sia preĝejo.

Malsevera en lia forto, rideta en lia saĝo ; la spirito ĉion konanta ; la koro ĉiam bonfaranta ; la mano ĉiam helpema ; l'animo ĉiam al la ĉielo.

Bela kaj sankta maljuneco kronata per ĉarmo akompanata de benadoj, iluminata per klarecoj, ĉirkaŭata de dankeco kaj respekto.

Li diris al mi « Mi perdis neniun el tiuj, kiujn Dio donis al mi ; mi ricevis de Dio tiun favoron, ke ĉiuj mortis en Lia kompato kaj paco. Mi neniam forlasis miajn paroĥanojn, escepte kiam mi devis ricevi la ordonojn kaj la benadojn de mia episkopo, aŭ min refortigi dum kelkaj tagoj en la ritreto.

Kaj mi povas diri, ke tiam mi ne forĝis ilin, ĉar mi ne ĉesis preĝi por ili, petante al Dio igi min pli inda por ilin gvidi.

Mi mortos nevidinte Parizon, mi pri tio havas nenan deziron. Mi enterigis tiom da homoj, kiuj vojaĝis tra la mondo kaj renkontis Dion nur ĉi tie !

Kiam mi forlasos la teron, mia sciemo kaj koro estos kontentaj. Atendante la ĉielon, miaj okuloj rigardadis sufiĉe da mirindaĵoj.

Mi aŭdis paroli pri viaj obeliskoj, kolonoj, palacoj kun dentaj ŝtonoj. Ĉu ili valoras tiom, kiom niaj ŝtonegoj, kiujn la maro kavigis kaj formadis dum sesmil jaroj ?

Ĉu viaj publikaj placoj iluminataj per la gaso havas l'amplekson de niaj marbordoj lumigataj per steloj ? Ĉu via akvumita makadamo ŝajnas al vi pli bela ol niaj maldikaj sabloj ?

Vi ŝatas viajn akvospacojn tiel grandajn kiel la mano kaj viajn fontanetojn ŝprucantajn. Mi vidis la vastan maron surĵeti ĝis niaj krutaĵoj ŝipojn armigitajn.

Sed tiuj diaj silentoj de l'maro kaj de l'kampoj trankvilaj, la dolĉeco de l'matenkrepuskoj, kaj la belegeco de l'sunoj subirantaj, — kie vi trovas ilin ?

Ĉiujare dum mia vivo, mi vidis la printempajn florojn kaj la verdantan fortikecon de l'somero ; mi vidis la diversajn kolorojn kaj la belajn ekfiniĝojn aŭtunajn.

Ĉiujare dum mia vivo, mi vidis la blankecon de l'neĝo ; mi

vidis niajn kampojn dormantajn en sia ermenkolora mantelo, ĝin forlasi nur por vesti sian printempan robon.

Tio ne estas unutona vidaĵo. Dudek fojojn en jaro la tero ŝanĝas sian ornamajon; oni admiras senliman diversecon en tiu ĉi neŝanĝebla harmonio.

La verko de Dio estas tio, kion mi vidis ĉiutage kaj dum ĉiuj horoj de l'tago, ĉiunokte kaj dum ĉiuj horoj de l'nokto.

Kaj nun, — kiam mia paŝado estas multepeza kaj miaj okuloj malfortigitaj, — mi ankoraŭ vidas tiujn belaĵojn, ili min ankoraŭ ravas.

Mia maljuna koro saltegas ankoraŭ en mia brusto. Mi rekonas ĉiujn voĉojn, kiuj parolis al mia juneco, kiuj parolis al ĝi pri la potenco de mia Dio.

Kaj mia sango, — kiun la aĝo devus esti glaciiginta, — bolas ankoraŭ, miaj okuloj malsekiĝas per feliĉaj larmoj kaj mi ekkrias « Ho Dio! kiom belaj estas viaj faroj! »

Mi priskribigis al mi Parizon. La kajoj estas tre rektaj, la rivero kunfluigas koton kaj malgrandajn ŝipetojn en ĝia ŝtona defluilo.

Estas nur altaj domoj; neniu loĝas sola en sia domo, nek eĉ sur sia etaĝo. Oni havas personojn super la kapo, personojn malsuper la piedoj.

Ĉie l'okulo de najbaro, kiun oni ne konas; ĉie popolamaso kaj rapideco. La veturiloj interkruciĝas, interfrapiĝas, bruegas.

Estas tiom da polico, ke oni opinias esti cirkaŭata de krimuloj. Vi preskaŭ neniam malfermas la okulojn sen vidi ian hontigan vidaĵon.

La stratoj havas multajn butikojn, la butikoj estas plenaj de maloftaĵoj. Multe da mebloj, rubandoj kaj ŝtofoj, multe da oraĵoj.

Tie, ĉio kio povas tenti la homan pasion sufiĉege elmetiĝas, La malhumileco ĉie vidiĝas, l'envio ĉie vekigigas. Dio kaŝiĝas.

Ne, mi ne volas vidi tion, kaj mi dankas Dion, ke mi ĝin ne vidis! Mi Lin dankas sep fojojn kaj deksepoble sep fojojn: Tial ke Li igis min restadi sur miaj sabloj lavitaj per la pura maro, sur miaj ŝtonegoj ornamitaj per konkoj kaj peucedanumoj<sup>1</sup>, sur miaj balzamumitaj kampoj;

1. Latine *Peucedanum*, el la familio de ombeliferoj.

miaj vojetoj ombritaj per belaj arboj, miaj karaj vojetoj verdantaj kaj malhelaj !

Tie, vi trovas l'ilekson <sup>2</sup> kaj la kratagon, kiuj floras en ilia sezono. La lonicero, la klematito, la hederero, la sovaĝa vinberujo pendas kiel graciaj festonoj:

Kalkulu tiujn florojn, de la humila veronika <sup>3</sup> tufo ĝis tiu altakreska kaj fiera floraro de verbasko <sup>4</sup>, kiu ekfloras sur sia velura trunketo

Vinko, konvolvulo, gladiolo<sup>5</sup>, ranunkolo <sup>6</sup>, eleganta, gra-  
Sur la stratoj de mia vilaĝo, kie mi marŝas sur la herbo; sur  
meno, sovaĝa rozo blanka kaj rozkolora; kaj matene, la dia-  
mantoj de l'roso;

Kaj la insektoj kun smeralda koloro, la flugantaj papilioj, la  
forkurantaj lacertoj, kaj la birdoj kantantaj.

Kiu butikisto estas tiel riĉa kiel unu el niaj branĉo-  
bariloj ?

Mi dankas Dion, mi Lin dankos ĉiutage en mia vivo, tial ke  
Li lasis min vivi en mia malalta domo, malsupre de mia  
preĝejo.

Mi lasis malfermita mian fenestron por vidi miajn najba-  
rojn, kaj por esti vidata de ili. Nokte kaj tage mi lasis mal-  
fermita mian pordon.

La malĝojeco kaj la malfeliĉo eniris nur por esti konsolitaj,  
la krimo eniris nur por penti.

Kiom da karaj amikoj transiris mian sojlon ! kiom da valo-  
raj koroj en tiuj malluksaj ĉambregoj ! kiom da festenoj agrablaj  
vidis mia lama tablo !

Sed nek ĉe mi, nek en domo de l'vilaĝo, la malsaĝa bruvo de  
l'festoj iam igis mallaŭtaj la sonoretojn de l'*Angelus*'o, pro  
kiu oni sonorigas tri fojojn ĉiutage.

La preĝo neniam estis pelita kiel gasto trudema. Ĝi frapas,  
la koroj malfermas eniru, Virgalino Mario; eniru Sinjoro  
Jesuo.

---

2. Latine *Ilex* ; ilekso jam troviĝas en la germana vortaro *Esperanto-Deutsch*. — 3. Latine. *Veronica*. — 4. Lat. *Verbascum*. — 5. Lat. *Gladiolus*. — 6. Lat. *ranunculus*.

Post la amikoj, malriĉuloj; post la koroj malĝojaj kaj pentantaj, iam baldaŭ, la morto eniros akompanata ankoraŭ de l'preĝo,

Venu, morto! tial ke Dio cin sendas, estu la bonvenanto. Faru cian oficon. Sed ne ĉe ni ci povas triumfi kaj moki.

Ci tenas falĉilon por falĉi, martelon por disrompi. Per la falĉilo ci tranĉas la fadenon de l'vivo; per la martelo ci disrompas niajn vanaĵojn.

Ci disrompas kaj disjetas ilin; ci rompas la monkestojn, kaj la mono kolektita disŝutiĝas; ci malfermas al la heredantoj la pordon fermitan al la malriĉuloj.

La mortanto rigardas cin agantan. Ĉio, kion li tiel penade amasigis, eĉ kelkafoje preze de sia animo, ci ĝin prenas.

Li rigardas cin farantan, kaj li ploras: « Ho ve! mia meblaro tiel luksa, miaj pentraĵoj, miaj multekostaj vazoj, miaj juveloj, mi do devas ĉion forlasi? »

— Ĉion, respondas la moka morto; kaj ciaj rangaj elpendaĵoj, ciaj krucoj, rubandoj, vestaĵoj orè broditaj, ilin mi ŝiras aŭ ekvendadas.

Mi venas por cin fortiri el cia palaco, kie multegaj vanaĵoj insultas la gravecon de l'morto; el cia luksa lito, kaj cin enfermi nudan en la ĉerko. »

Sed en niaj dometoj, ho triumfantino! kiam ci venas por preni la senvaloran korpon apartenantan al ci, sed kiun ci devos iam redoni;

Kiam cia falĉilo tranĉis la fadenon eluzitan de l'vivo, kion ci havas ankoraŭ por fari? kion ci pensas ankoraŭ rabi?

Miaj mebloj estas tiuj, kiujn mi trovis, antaŭ kvindek jaroj, enirante tien ĉi. En loko senriska mi metis miajn librojn, mi donacis ilin. Mian monon mi donis. Mia robo flikita kaj mia senora stolo<sup>1</sup>, mi kunportos ilin en la tombon. Animo mia eliros kaj al Dio aliros.

Kaj kiam, en la tago de l'Juĝo Lasta, l'angela voko resonos.

1. Latine *stola* — pastra vesto longa kaj mallarĝa, kiun la pastro portas sur la kolo, dum la meso.

kiam la voĉo de l'Dia heraldo — vekante ĉiujn mortintojn — diros al ili

Starigu!

Mia robaĉo flikita ŝajnos kiel brila purpuro; mia senvalora eluzita stolo disjetos eternajn radiojn.

El *Cà et là* de Louis VEUILLOT.

Tradukis VINKO.

## LA KOLBASO KAJ LA HUNDO

Kelkaj studentoj de Heidelberg pilgrimis ofte en bone direktitan biertrinkejon de proksima vilaĝo. Tiel ili denove iafoje marŝis tien kaj kiel ĉiam ankaŭ tiun fojon akompanis ilin ilia granda hundo, Bojisto, kiu apartenis al ĉiuj kaj tamen al neniu. Sed dum en la bierĝardeno la studentoj trinkis kaj kantis, Bojisto sekvis sian propran nazon kaj venis tiamaniere en la povizajejon de la gastejo, kie hazarde troviĝis nenio ol stango plena de kolbasoj. Bojisto estis ordinare prudenta kaj ŝtelis ordinare nur kelkope; sed tiafoje li manĝis ĉiujn kolbasojn, nur ne la stangojn kaj la kolbaslaĉojn, sed tiujn ĉi lastajn li portis ventumante sub la tablon de la studentoj. Kiam tiuj rimarkis la heroan faron de la hundo, ili pagis la drinkitaĵojn kaj foriris ridante. Pro malfacila digesto Bojisto spiregis kun elpendanta lango kaj lekis el ĉiu marĉeto surstrata ĉar kolbasoj soifigas. Sed la studentoj decidis fordresi fundamente al sia hundo la pasion por kolbasoj. Ĉiutage trifoje ili prezentis al li unu kolbason kaj ĉiufoje, kiam li volis ekkapti ĝin, li suferis regule batojn, ĝis ke li fariĝis principa kontraŭkolbasisto. Tiam denove la studentoj migris kun li en tiun gastejon. La gastigantino tuj alvokis ilin « Ah, sinjoroj, sed via hundo! » « Kion do? » Li manĝis ĉiujn kolbasojn! » Tiam la studentoj eksonigis Homer'an, an ridadon kaj diris « Li ja tute ne manĝas kolbasojn! » — « Tion ni vidos », ŝi diris kaj venigis el la kuirejo kolbason. La studentoj prezentis ĝin al la hundo, sed tiu murmuris kaj retroiris « Donu al mi mem la kolbason », diris la gastigantino, « kaj ni vidu, ĉu li ne manĝos ĝin ». Kaj ŝi



prezentis mem ĝin al li, sed tiam Bojisto eĉ ekkriegis, tiris la voston inter la krurojn kaj forrapidis tra la pordo eksteren, dum laŭtege ridis la ĉeestantaj gastoj. Sed poste kompreneble, laŭ kavalira maniero, la studentoj rakontis al la gastigantino la puran veron kaj pagis ankaŭ la kolbasojn.

ZAKERL CHARLES.

## PAĜO DE L'DIREKTORO

**Administraciaj avizoj.** 1<sup>o</sup>. — Nenion sendu ĉe la **presisto** de E. K. nek manuskriptojn, nek gazetojn, nek abonmonon, nek mendon ajn. Tre ofte oni donas al ni la ricevitaĵojn nur kelkajn monatojn poste!...

2<sup>o</sup> Kelkaj abonantoj ne avertas nin pri ŝanĝo de sia adreso, kaj poste plendas pri la nericevo de la gazeto. Ni ne povas akcepti respondecon de tiaj nericevoj, kaj petas, ke oni ĉiam konatigu la ŝanĝojn de adreso ĝustatempe.

3<sup>o</sup> Multaj Esperantistoj ne skribas sian adreson, aŭ skribas ĝin nelegeble, kiam ili skribas al ni. Tio kaŭzas al ni grandan perdon da tempo por serĉi la diritan adreson en la nomaro de niaj abonantoj. Ni proponas al niaj samideanoj uzi la tre malkarajn ŝtampilojn kaŭĉukajn. Ni povas liveri tiajn ŝtampilojn por diversaj prezoj, laŭ la longeco de la teksto. Petu informojn.

4-e. Multaj gazetoj ankoraŭ donas la adreson de E. K. ĉe la presisto, S-o Barbot. Ni insiste petas, ke ili bonvolu ŝanĝi tiun malbonan adreson, kiu kaŭzis al ni jam multe da enuoj.

**La Abonilo enmetita en la decembra N-o.** — Ni jam ricevis nomojn de novaj abonantoj. Ni prokrastas ĝis venonta numero la nomaron de la *varbintoj*. Ni esperas, ke niaj amikoj fervore klopodos por **DUOBLIGI L'ABONANTARON**. — Ni tie ĉi represas la tekston de l'*Abonilo*:

Varbu **Unu** abonanton inter viaj amikoj aŭ konatoj. Sendu al ni la adreson de l'*varbito* per tiu **Abonilo**, kune kun poŝtmandato. Vi ricevos kiel premio, laŭ via deziro: Ĉu ekzempleron de **kato kun botoj**, lukse eldonita ĉu **rabaton** da 10 % pri via abono proksima (aŭ pri la nuna, se ĝi ne estas ankoraŭ pagita)

via abono estos do 4 fr. 50 ekster Franclo., kaj 3 fr. 60 en Franclo. Plie la nomaro de la varbintoj estos publikigata en E. K.

**Hebrea Kalendaro.** — Tio estas la titolo de nova libreto en presado, originale verkita de Pastro Jakobo Bianchini, nia fervora Delegito por Italujo. Tiu libro estos vendata por la profito de E. K. kaj kostos nur 0 fr. 20. (Ne sendu monon antaŭ ol ni anoncos ke la libro estas presita!). — Jen parto de l'Antaŭparolo de tiu kurioza verketo:

« Nur malmulte ni konas la kutimojn Hebreajn. Oftege oni parolas pri tiuj festoj, kiujn samnome ankaŭ ni havas. Pro tio mi esperas plaĉi al la legantaro publikigante mallongan tagkalendaron hebrean de l'lasta jarcento antaŭ Jesu-Kristo. — Se tiu plaĉos al la legantoj, en dua eldono mi verkos ankaŭ sciigojn pri ĉiuj festoj kaj kutimoj de la antikvaj Izraelidoj. » — Ni tre rekomendas la **Hebrean Kalendaron** al niaj legantoj. Ĝi estos utila helpo en la legado de la Sankta Skribo.

**Romo, Jerusalemo, Parizo.** — Unu el niaj abonantoj kaj Bonfarantoj komunikis al ni belegan ideon. Li esprimas la deziron, ke *Espero Katolika* havu tri grandajn centrojn, en Romo, Jerusalemo, kaj Parizo. Unue, mi pensas, ni bezonus **Katolikan Oficejon** en tiuj tri urboj, por doni al la Esperantistaj Katolikoj specialajn informojn pri la loĝado, religiaj kuriozaĵoj, preĝejoj, diservoj, ktp., aŭ por laŭbezone gvidi en la urbo la vojaĝantojn. — Plie nia estimata korespondanto deziras, ke dum la kongresoj Esperantistaj, en la sama tago, kiam oni tie solenigos meson por Esperantistoj, oni ankaŭ havu diservon por Esperantistoj en Romo, Jerusalemo kaj Parizo. Tiu bela ideo estos realigebla, nur kiam ni havos specialan Klubon de Esperantistaj Katolikoj en ĉiu el la tri urboj. — Ni petas de niaj amikoj konsilojn, helpon por efektiviĝi tiun proponon.

**La Preĝaro.** Pro malsano mia ankoraŭ estas prokrastita la apero de l'Preĝaro. Sed tamen mi zorgas pri ĝi: estu ankoraŭ paciencaj, karaj subskribintoj! En proksima n-o mi komencos **Komentaron pri la Praĝaro**, por klarigi esprimojn aŭ elekton de tekstoj, kiuj ŝajnus arbitraj.

Ni devas klarigi la ŝanĝojn de la prezo presitajn sur la kovrilo.

de E. K. — Pro malkompreno oni ĝis nun anoncis, ke la prezo estus preskaŭ sama por la subskribintoj kaj por aliaj aĉetentoj. La prezo restas 3 fr. por la tri kajeroj, nur por la subskribintoj. La prezo de la dua kaj tria kajero restas 1 fr. 10 por ĉiu kajero kaj por la ne-subskribintoj. Sed la prezo de l'unua kajero, estas 2 fr. 50 ( 2 ŝilingoj, 2 markoj ) por la ne-subskribintoj. Tiel estis la eraro.

**Les Langues Vivantes** (La Vivaj Lingvoj). Tiu revuo kvinlingva, kies celo estas lernigi la fremdajn lingvojn, akceptis lernigi ankaŭ Esperanton ! Tio estas fakto rimarkinda kaj povas esti donata kiel pruvo, ke Esperanto ne estas malamiko de l'vivaj lingvoj, same kiel la Gramatiko de S-o Boulét por lernigi la francan lingvon per Esperanto. Ni petas niajn kolegojn, ke ili parolu pri tiu revuo en siaj gazetoj. La Posedanto de « Langues Vivantes » estas S-o A. Hahn (Neuilly-s-Seine), kaj la eldonisto estas la grava firmo, Pariza Bloud kaj K-o, tre favora al Esperanto. (Tion baldaŭ ni montros per tre interesa komunikajo).

**Verkoj en preparado.** — Por eviti ke « pluraj » Esperantistoj laboradu pri sama temo aŭ libro, ni anoncas tie ĉi la verkojn, kiujn niaj amikoj preparas :

Krom la **Preĝaro** estas preta ankaŭ la manuskripto de l'**Imitado de Jesu-Kristo** ; la **Letero de S. Jakobo**, en la Sankta Skribo ; la **Hebrea Kalendaro**, kiun ni anoncis.

La **Kvar Evangelioj en unu teksto**, laŭ la plej bonaj ekzegezaj laboroj, ankaŭ estos baldaŭ finita.

Pri la traduko de la **Sankta Skribo**, sin turni al Pastro J. Bianchini. **S. Ķuirino de Pordenone (Udine) Italujo.**

---

## El Nia Leteraro

Tie ĉi ni presos leterojn, kiujn oni sendas al ni por publikigo, aŭ kiuj povas interesi la legantojn.

### El Hispanujo.

Respektinda Pastro kaj estimata amiko.

En tiuj tagoj teruraj por la franca katolikaro, mi plenumas devon dirante al vi kion vi certe scias : ke la plimulto de la

Hispanoj ne povas apartigi sian penson kaj sian koron el siaj amataj najbaraj samreligiĝantoj, kaj ĉefe el viaj episkopoj kaj pastroj, kiuj nun suferas malnoblan tiranecon, kaŝitan sub la belaj nomoj de « Libereco, Egaleco kaj Frateco ». Tamen mi esperas ke baldaŭ la Bona Dio kompotos al vi kaj al Francujo, kaj Li redonos al vi sian sanktan pacon. Feliĉe, la Hispanoj, avertitaj pri la procedoj de la framasonoj kaj liberpensuloj, pretiĝas por serioze kontraŭstari la agadon de tiuj, kiuj volas *traduki Hispanen* la persekutadon, kiun vi suferas.

Mi kaj mia familio, kiu multe vin estimas, sendas al vi koran saluton kaj bedaŭresprimon, dezirante ke vi suferu kiel eble plej malmulte kaj ke viaj katolikaj sampatrujanoj ne submetiĝu, malobeante la ordonojn de Nia Sankta Patro.

Viega. R. CODORNIU (Murcia).

### El Angllando.

Estiminda Sinjoro.

Permesu al mi sendi mian simpatian. Via patrujo estas nia najbaro; via eklezio estas (laŭ nia opinio) nia fratina-eklezio. Vere ni, kiuj sin nomas « Anglaj-Katolikoj », pensadas pri la tuta mondo katolika. Ni respektas nian ĉefepiskopon de Cantorbury, kaj nian eklezian hierarkion; sed tiu ĉi estas parto de la tuta Eklezio Katolika, — unu el la tri grandaj partoj en la Eklezio katolika. Do ni konsentas kun ĉiu parto dum la tempo de persekutado. Mi esperas ke la tagjurnaloj ne raportas akurate pri via patrujo. Mi esperas, ke la afero estas pli bona ol la novaĵoj pri ĝi. Tiu ĉi persekutado estas ja bedaŭrinda. Ni mem havas multon da malgrandaj ĉagrenoj; sed la suferado en Francujo, nune, similas al tiuj de l'fruaĵ jarcentoj de l'kristanismo.

Simpatio estu do al la katolikoj en Francujo: pastroj kaj popolo...

F-ino M. E. COWPER, F. B. E. A. (Londono).

### El Hispanujo (Katalunjo).

S-o Direktoro de *Espero Katolika*.

Ricevinte vian revuon (oktobro, de la lasta jaro) kaj poste vian amindan poŝtkarton, per kiu vi sendas korajn salutojn al karaj samideanoj de Aplech'a Esperanta grupo, — antaŭ ĉio mi

dankas vin pro via ĝentileco, resendante al vi korajn kaj amikajn salutojn de ĉiuj grupanoj de Aplech'

Mi gratulas vin pro la granda favoro, kiun faris al vi kaj al ĉiuj Esperantistaj katolikoj nia Papa Moŝto Pio X-a, benante la revuon *Espero Katolika*. — Eble estus tre utila, ke E. K. havus konstantan riprezentadon en Katalunjo, por la disvastigo de nia amata Zamenhof'a lingvo, kaj ankaŭ por pligrandigi la amon de la nunaj homoj al Jesu-Kristo, la nemortebla reĝo de la jarcentoj.

Volu, mi petas, skribi al mi, kion vi pensas pri mia propono, kaj laŭ via respondo, mi ĝin proponos al la kunsido de Aplech.

Viega. — Jozefo MARCET y SOLER (Sabadel).

— Ju pli multaj estos niaj Delegitoj en diversaj regionoj, des pli potenca estos nia agado. Tial ni plezure akceptos Delegiton por Katalunjo, kiel ni jam bavas por Polujo, kvankam ĝi estas en Ruslando,

La Direktoro.

**El Polujo.**

Honorinda Pastro.

Antaŭ kelkaj tagoj mi recevis longe atenditan n-on de E.K decembra Ĝi eliris sufiĉe malfrue, sed se oni turnos atenton al via sano, oni ne bezonos tion ĉi miri. Tiu ĉu numero alportis kun si tre gravan artikolon « Kelkaj Klarigoj », kiu profunde min tuŝis kaj samtempe igis min fari ion miaflanke por subteni E. K. Rimedo al tio ĉi devis esti varbado de novaj abonantoj.

Antaŭ unu jaro, en nia seminario, kiu kalkulas 150 lernantojn, ekinteresiĝo al Esperanto estis sufiĉe malforta ; eĉ oni povas diri nenia. De kio tio ĉi devenis, mi nescias ; sed ŝajnas ke de tio ĉi precipe, ke malmulte oni sciis ĉe ni pri tiu ĉi lingvo ; entute oni havis tre malklaran komprenon de bezeno kaj ideo de lingvo internacia. De ia tamen tempo, tiu ĉi stato de aferoj komencas ŝanĝiĝi. Lingvo ĉi tiu varbas al si amikojn sincerajn, vere ke malrapide, sed konstante ; kaj hodiaŭ ni kalkulas dekon da esperantistaj seminarianoj, kiuj tiun lingvon en momentoj liberaj de okupoj ĉiutagaj lernas. Krom tio estas mul-

taj, kiuj promesis al mi lerni ĝin. Ni nomas ilin « simpatiuloj ». En propagando de Esperanto tre ankaŭ helpadis *Espero Katolika*, kiun mi abonis dum pasinta jaro. Tial kiam mi sendis al vi abonpagon por nuna jaro, kelkaj el miaj kolegoj volis aboni unu numeron de E. K. *kune*, kion mi konsentis. **Hodiaŭ tamen kiam ni tralegis «Kelkaj Klarigoj», ni decidis aboni E. K. en nuna jaro ĉiu aparte po unu ekzemplero...**

Mi finas mian leteron transsendante al vi varmegan peton de miaj kolegoj kaj de mi: Ne lasu E. K. kaj Esperanton, ne lasu vojon sur kiu vi ĝis nun tiel kuraĝe, pacience iris; kredis, ke post vi staras multaj katolikaj esperantistoj, kiuj deziras posedi propran organon; kredis ke ili ne permesos fali al nia revuo E. K., ke ili per ĉiuj fortoj kunhelpados vin en via malfacila laboro.

Miaj kolegoj esperantistaj kaj mi korege vin salutas kaj deziras al vi plej bonan sanon.

F. RAWICKI, katolika seminariano.

(WŁOCKLAWEK, POLUJO).

---

## PROPAGANDA KRONIKO

### Belga.

**Esperanto en katolikaj lernejoj.** — La « Ursulinaj Monakinoj », en Londerzeel, instruas Esperanton en sia Lernejo por junulinoj, kie estas multaj fremdulinoj.

La « *Ecole Normale Catholique* » de Wavre-Notre-Dame enskribis Esperanto'n sur sia programo.

**El Letero (sept. 1906) de la Belga Episkoparo :** « Estas necese, ke ni havu ĉe la kursoj Universitataj *internacian lingvon*, por faciligi la rilatojn kun la plej influaj naĉioj en la mondo... Ĉiuj penoj por krei sciencan internacian lingvon artefaritan ĝis nun malsukcesis... »

Mi tre petas niajn amikojn Belgajn, ke ili sendu al mi la plenan tekston de la citita *Letero*. Kredeble, se influaj katolikoj Esperantistaj farus grupe viziton al la Rektoro de la Lovena fama Universitato, ne por tuj alprenigi Esperanto'n, sed alme-

naŭ por konigi, ke « ĉiuj penoj ne malsukcesis », kaj ke Esperanto jam solvis la problemon de lingvo internacia, — prezantante samtempe *Espero Katolika* kaj parolante pri la Papa Beno donita al ĝi, — espereble oni renkontus simpatian kaj eble ion pli...

(Ni ne ĉion diris pri la aktiveco de niaj Belgaj amikoj. Tiu *Kroniko* estos daŭrigata en la proksima numero, en kiu troviĝos ankaŭ informoj pri ceteraj landoj. (E. P.)

## NOTETOJ

### ENKETO PRI EDUKADO — REZULTATOJ. —

Niaj legantoj ne forgesis la grandan enketon malfermitan, de « Tra la mondo », pri la edukado en ĉiuj landoj, en kiu kelkaj el ili partoprenis.

La alvoko de nia « Ilustrato » estis aŭdata, kaj dokumentoj alvenis de multaj landoj, inter kiuj estas speciale citindaj pro sia intereso, tiuj ricevitaj de Bavarujo, Bohemujo, Britujo, Bulgarujo, Finlando, Francujo, Ĥinujo, Italujo, Japanujo, Polujo, Rusujo, Skotlando, Tahiti, Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. Nia distinginda, S<sup>ro</sup> Th. Rousseau, doktoro de Sciencoj, kiu prenis sur sin la taskon verki la raporton, ĵus finis sian laboron, kies enpresado komenciĝis en la februara n<sup>o</sup> de « Tra la mondo ». Ni rekomendas la legadon de tiu raporto al ĉiuj niaj legantoj, ĉar ĝi interesas, ja, ĉiujn homojn gepatrojn kaj infanojn; kaj precipe la geinstruistojn kaj geedukistojn. Plue, la raporto estas bonega armilo por la propagando, montrante *praktikan* aplikon de Esperanto. Kompreneble, la raporto estas akompanata de ilustraĵoj, kiuj pligrandigos ĝian allogon. Ĝi daŭros dum 4 monatoj. Ni konsilas tuj mendi la N<sup>o</sup>jn, kaj transdonos la mendojn *akompanatajn de l'mono*,

En sia Januara N<sup>o</sup>, « Tra la mondo » komencis serion da artikoloj pri Anglujo kaj Cambridge.

Krom siaj intereso, varieco kaj plena internacieco, « Tra la mondo » estas speciale atentinda kaj ŝatinda pro siaj reguleco kaj akurateco, pri kiuj ni altiras la atenton de niaj legantoj.



Specimo senpaga estos sendata laŭ peto farita je nia nomo.

**Tutmonda Esperantista Poŝkalendaro por la jaro 1908<sup>a</sup>.** En la fino de l'nuna jaro la firmo Esperanto Verlag Moller kaj Borel, Berlin, eldonos tutmondan esperantistan Poŝkalendaron por la venonta jaro. Ĝi enhavos en praktika kaj oportuna formato kaj aranĝo interesan materialon por Esperantistoj, diversajn sciigojn internaciajn, kiujn oni alie devas serĉi en multaj apartaj verkoj: tabelojn, adresojn k. t. p.

Ni supozas, ke la tekstoj plene kontentigos ĉiujn Esperantistojn, kiuj volas ĉiam tuj sciigi pri kelkaj necesaj faktoj tuŝantaj la esperantan aferon aŭ havantaj signifon internacian en klara, pririgardebla maniero. La redaktadon prenis sur sin S<sup>r</sup>. J. Schroder, Wien, VII. Kaiserstrasse 10, kiu volonte akceptos proponojn aŭ dezirojn de nia legantaro por tiu ĉi celo kaj plenumos ilin laŭ ebleco.

Ni insiste petas ĉiujn grupojn, klubojn, konsulejojn aŭ informejojn, sendi la precizajn adresojn al la nomita redaktoro. Samtempe la hoteloj kaj firmoj, kiuj uzas Esperanton parole aŭ skribe, estas petataj sciigi lin pri tio.

Anoncoj por la Kalendaro estas akceptataj jam nun de Esperanto Verlag Moller kaj Borel, Berlin S., Prinzenstr. 95. La prezo de l'Kalendaro estos malalta, tial ke ĉiu Esperantisto en la mondo povu aĉeti ĝin.

**Al la Esperantistoj Sportistoj!** La franca ĉiusemajna revuo *Tous les Sports* (Ĉiuj Sportoj) oficiala gazeto de la « *Unuiĝo de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj* », enpresas regule kronikon en Esperanto pri la ĉefaj sportaj okazintaĵoj. Tio estas *tre grava* por la disvastigo de Esperanto en la Sportistaro, ĉar la U. S. F. S. A. regas sur pli ol mil societoj kaj almenaŭ 100.000 atletoj.

S<sup>o</sup> *Louis de Guesnet*, kiu verkos tiun kronikon, treege petas korespondantojn kompetentajn en ĉiuj landoj por sendi al li sportajn sciigojn kaj elekti la necesajn teknikajn vortojn kaj esprimojn pri la diversaj sportoj. Sin turni senpere al li: *Esperanta Konsulejo, Chartres, Francujo*.

---

## MONOFEROJ POR E. K.

S-ino Milsom (Collonges-s-Salève) 50 fr. — P-o Marcos Lliro (Sabadell) 1 fr. — P-o Antoni Ribalta (Sabadell) 1 fr. — Grafo Chandon de Briailles (Epernay) 2 fr. — Pastro P. Géant (Le Vé sinet) 1 fr. — F-ino d'Estampes (Pau) 36 fr. — Fino Stribick (Paris) 1 fr. — S-o J. Vogel (Paderborn) 1 fr. — S-o Gaudard (Besançon) 1 fr. **Sumo : 94 fr.**

Antaŭaj donacoj 671 fr. 25 + 94 = 765,25.

La ŝuldo da 700 fr. estas do tute pagita, kaj denove ni sendas niajn plej sincerajn dankojn al niaj donacintoj, pro ilia granda helpo kaj malavareco. Restas 65 fr. 25, kies destinon ni klarigos en venonta numero.

LA DIREKTORO.

## ŜAKOJ

(Snb la redakcio de John Ellis, el Keighley, Anglujo),  
LUDO 10-a

Ludita en la kvarflanka turniro en Peterburg'o.

VIENA Ludkomenco.

| BLANKO                                                                                                                              | NIGRO          | BLANKO                                                                                                      | NIGRO       |
|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------|
| E.-A. Snosko Borovski                                                                                                               | P.-A. Eftivief | 17. D — 6K                                                                                                  | TD — 1R     |
| 1. S — 4R                                                                                                                           | S — 4R         | 18. S — 5D                                                                                                  | K — 2D      |
| 2. Ĉ — 3KD                                                                                                                          | Ĉ — 3KD        | 19. Ĉ — 1Ĉ                                                                                                  |             |
| 3. K — 4K                                                                                                                           | K — 4K         | Oferti la S-on estas nenecese. Li povus ludi 19 T — 3K. K — 5Ĉ; 20 T — 2K, K × Ĉ; 21 T × K kaj 22 TD — 1KR. |             |
| Ordinare estas plibone disvolvi Ĉ-ojn antaŭ K-ojn. Tie ĉi Ĉ — 3K estas preferinde, por ke N povu respondi al ebla S — 3D per K — 5Ĉ |                | 20. T — 3K                                                                                                  | .. 19 D × S |
| 4. S — 3D                                                                                                                           | S — 3D         | 21. TD — 1KR                                                                                                | D — 2T      |
| 5. S × 3TR                                                                                                                          | S — 3TD        | 22. T — 3K                                                                                                  | D × 1Ĉ      |
| 6. ĈR × 2R                                                                                                                          | Ĉ — 3K         | 23. S — 4T                                                                                                  | S — 4K      |
| 7. K — 3R                                                                                                                           | K × K          | 24. S — 5T                                                                                                  | K — 5Ĉ      |
| 8. S × K                                                                                                                            | Ĉ — 4TD        | 25. D — 4T                                                                                                  | K × S       |
| 9. K — 3Ĉ                                                                                                                           | Ĉ × K          | 26. Ĉ — 1T                                                                                                  | S — 3K      |
| 10. ST × Ĉ                                                                                                                          | K — 3R         | 27. D — 1R                                                                                                  | S — 4ĈR     |
| 11. Ĉ — 3Ĉ                                                                                                                          | Reĝsaltas      | 28. Ĉ — 2K                                                                                                  | T — 2R      |
| 12. Reĝsaltas                                                                                                                       | S — 3ĈR        | 29. D — 2D                                                                                                  | S — 5Ĉ      |
| 13. D — 3K                                                                                                                          | Ĉ — 1R         | 30. T — 3Ĉ                                                                                                  | TD — 2KR    |
| 14. S — 4D                                                                                                                          | D — 5T         | 31. S × S                                                                                                   | S — 4K      |
| 15. ĈD — 2R                                                                                                                         | D — 3T         | 32. Ĉ — 3K                                                                                                  | T × S       |
| 16. R × 2T                                                                                                                          |                | Nur la malespero ! De la 25-a iro li batalis neegalan batalon.                                              |             |
| Ĉ — 1T ŝajnas plibone                                                                                                               | 16 Ĉ — 2Ĉ      | 32. S × Ĉ                                                                                                   |             |
|                                                                                                                                     |                | K — 3Ĉ                                                                                                      |             |
|                                                                                                                                     |                | 33. D — 6T                                                                                                  |             |
|                                                                                                                                     |                | 34. Ĉ — 4R                                                                                                  |             |
|                                                                                                                                     |                | 35. Cedas                                                                                                   |             |
|                                                                                                                                     |                |                                                                                                             | T — 4T (ŝ)  |

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro: Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono: 23 fr. (En Franc. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

JUNA ESPERANTISTO, monata gazeto por Junuloj, instruistoj, eklernantoj, abono: 2 fr. 50. — Ĉe Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Specimeno senpage.

► LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ: S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 02, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

## **INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ**

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj sribi por pluaj sciigoj al la Direktoro:

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO

**NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS**

**AKCEPTAJAJ SAMTEMPE**

(10-5)

PENSIO POR GESINJOROJ: GENEVO. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

**SOCIETO DE ESPERANTISTAJ ŜAKLUDISTOJ**, fondita dum la Ĝeneva Kongreso. — Prezidanto: Em. Peltier, Direktoro de E. K. — Sekretario: S-o John Ellis, en Keighley (Anglujo). — Kotizaĵo: 5 fr. (4 fr. en Franc.) donas rajton ricevi E. K., oficialan organon de la Societo. — Ŝakturniro prepariĝas por la tria Kongreso. — Sendu aliĝojn al la Sekretario.

**LES LANGUES VIVANTES** (*La Vivaj lingvoj*) Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca, kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Publikigas kurson pri Esperanto de P-o Em. Peltier. Eldonita de Pariza firmo Bloud.

|                 |                    |                  |                  |                 |
|-----------------|--------------------|------------------|------------------|-----------------|
| <b>Abonoj :</b> | <b>PLENA REVUO</b> | <b>3 LINGVOJ</b> | <b>2 LINGVOJ</b> | <b>1 LINGVO</b> |
| Francl.         | 7 fr. 50           | 6 fr.            | 4 fr. 50         | 3 fr.           |
| Eskter Fr.      | 9 fr. 50           | 7 fr.            | 5 fr. 50         | 4 fr.           |

Oni abonas ĉe la Direktoro de E. K.—Specimenon senpage.

**LA REVUO** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>o</sup> ZAMENHOF. — Ce Hachette k. K<sup>o</sup> Paris. — Jare, Francujo : Fr. 6 ; ceteraj landoj : Fr. 7.

**LINGVO INTERNACIA**, centra organo de la Esperantistoj, la plej malno gazeto (1895, eliras nun la 15-an de ĉiu monato. Abono : 5 fr. — Kun Literatura Aldono : 7 fr. 50. Specimenon senpage. — Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

**ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SÓCIETO POR LA PACO**, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerco, industrio ; militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaĵaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

**Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton.** Verkis Profesoro A. DOMBROVSKI (2-a eldon.) 0 fr. 65

**Pri novaj trigonometriaj sistemoj.** Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI..... 1 fr. 80

(Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

**PRĜGARO** (*en preparo*). Tri kajeroj, kies unua nun ekpresigis (por la subskribintoj)..... 3 fr. »»

Unua kajero (por ne-subskribintoj)..... 2 fr. 50

**EN PRESADO :** *Hebrea Kalendaro*, 16-paĝ. broŝuro, de Pastro Jakobo BIANCHINI..... 0 fr. 20